
N-ro 179 Junio 2004 (2)

Naturamika Internacio
Esperanto Fako
TANEF



# LA Migranto

# La Migranto

*Ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj.*
*Eldonita kun aprobo kaj interkonsento de la Naturamika Internacio .*

Eldonanto TANEF
Apermonatoj
marto, junio, septembro, decembro.

Redaktofino
ĉiam la 1an de la antaŭa monato.

Naturamika internacio-NAI
Ĝen. Sekretario: Michael Proch'azka
Diefenbachgasse 36, A-1150 Wien,Aŭstria

Internacia fakreferanto :
Vakas.

Ĉefredaktorino: Antje Noordewier-Jagtenberg
Emmalaan 7, NL-3832 AH Leusden,Nederlando
Retadreso: bart.noordewier@12move.nl

Redaktorino: Erna Döring
Klingelbergstr.11, CH-4056,Basel Svislando.

Redaktoro / Korektanto: Bert de Wit
Houtvaartkade 21, NL-2111 BR, Aerdenhout,
Nederlando.
Retadreso: ajf.dewit@wanadoo.nl

La aŭtoroj mem respondecas.

Kasisto/abonanto-administracio :
Eric Baert, Rue des Taillis 23
BE-1420 Braine L'Alleud BELGIO.
ĝirkonto: n-ro 7543982 nome de "La Migranto"
Rue des Taillis 23, Braine L' Alleud BELGIO.
Rete : eric.baert@swing.be
Pagoj el eŭrolandoj sub mencio de Iban-nro :
Konto La Migranto NL 77 PSTB 0007543982
BIC:PSTBNL.21

UEA-konto tanf-a
Vi ne uzu la vorton "kotizo" aŭ"abono" sur via pagilo por eviti imposton. Se eble pagu al via landa peranto. La adreson vi trovas ĉiujare sur la koloraj paĝoj en la 4-a n-ro de La Migranto. Jarabono € 10

Presisto:
Grammé, Amersfoort, Nederlando.

Ĉi tiu gazeto estas presita sur medioafabla papero sen kloro.

**Recivitaj gazetoj, revuoj, k.a.**

Esperanto La Verda Stelo '94.nr-o 25
Norvega Esperantisto 1, 2
Horizontaal 2004, 2, 3
Le monde de l'Espéranto 544, 545
La Kancerkliniko 109, 110
Kajero el la Sudo 61a 2004
Internaciisto 2 – 3
SLEA Informilo 2
Internacia Fervojisto 2004/2
La Sago 4 – 5
La kreskanta ekonomio de la EU
Pli da unueco, pli da diverseco (EU) (nederlandlingve)
Sennaciulo 1185 – 1186 – 1187
Sennacieca Revuo de SAT 132-2004
Revuo Esperanto UEA 1168, 1169, 1170

**Enhavo :**

Nia nova ĝenerala sekretaro 3
Manfred Pils. TANEF-kunveno 4
La tutamerika Kongreso 5-6
Homo homojn lupo estas 7
Universala Deklaracio (6art.) 8
La sterniĝarbo 9
Gravaj kongresoj 10
Gazetara teksto NFI 11
Virinoj pri kiuj la mondo povas esti fieraj. 12-13
La birdoj en mia regiono 14
La Naturamika Domo "Het Hunehuis " 15-16

Sur la frontpaĝo : La cikonio.

## Nia nova ĝenerala sekretario



La estraro de Naturamika Internacio elektis novan ĝeneralan sekretarion el granda aro da kandidatoj. En la persono de Michael Procházka ĝi ekhavis junan, simpatian kaj dinamisman naturamikon. Jam kelkajn jarojn li estas aktiva en la rondoj de la Neregistaraj Organizoj. Kiel kunordiganto kaj vicprezidanto de "Domo de Respondeco – Unuiĝo por Servoj Eksterlande" li i.a. povis akiri gravajn spertojn en la kampo de EU-projektoj.

Michael Procházka daŭrigos la elprovitan laboron surbaze de la kongresdecidoj, sed ankaŭ pludisvolvos ilin kaj aldonos prioritatojn laŭenhave. Lige al la 110-jara ekzistado en 2005 de la Naturamikoj kaj la 100-jara ekzistado de la Naturamikoj en Svislando kaj Germanio, necesas evolui nian tutan laboron kaj renovigi ĝin. Por la nova ĝenerala sekretario ĉi tio estas grava dato kaj granda defio.

### Etapoj en la kariero

Kiel lerninta turista fakulo Michael Procházka jam laboris jardekon en la hotela mondo, i.a. en Suda Tirolo, Nov-Jorko kaj Liono. Li studis internacian ekonomion en Vieno, Parizo kaj Nanĉango (Ĉinio), samkiel etnologion kaj sinologion. Krome li estis kunlaboranto kaj poste ankaŭ ekonomia referanto de la aŭstria altlerneja asocio.

Profesie li laboris ĉe Bank Aŭstria en Parizo, ĉe Komerca Konsilantaro de la aŭstria ambasadejo en Kuala Lumpuro, en Hongkongo kaj ĉe komerca organizo en Nanĉango.Tiel li ekhavis bonan enrigardon en aliajn kulturojn kaj iliajn mondkonceptojn. Tiel li ekhavis la kompetenton peri komprenon por la diversaj kulturoj kaj pro tio nun engaĝiĝas ankaŭ pli por paco kaj interpopola kompreniĝo.

### Reveno en Aŭstrion

Post jaroj da studenta, profesia kaj kultura migradoj Michael Procházka revenis en Aŭstrion kaj povis utiligi siajn internaciajn kompetentojn por la « Domo de Respondeco » Ĉi tiu organizo disponas pri reto mondvaste de pli ol 60 laborigejoj, kien oni sendas junulojn por sociala, medioprotekta porpaca aŭ memoriga laboroj. Ankaŭ projektoj pri disvolva helpo troviĝas inter tiuj.

En la universitato de Vieno Michael Procházka instruas pri la specialaĵoj de Aŭstrio kaj EU en la kadro de studoj pri landoj. Krom la germanan kaj ĉeĥan li ankaŭ parolas la anglan, francan, italan kaj ĉinan.

Li plenkreskis en naturdediĉita familia rondo kaj jam pli ol 20 jarojn membras en la naturamika

movado. Ĉe prof. Fritz Moravec li ekhavis edukadon pri alpmonta grimpado. Li estas sociema sed ankaŭ entuziasma skianto kaj montgrimpanto. Kiel konscia konsumanto Michael Prochàzka ankaŭ lernis aktivi por la vivmedio kaj la protektado de la naturo.
De la 1-a de septembro 2003 li gvidas la ĝeneralan sekretariejon de NAI kaj helpe de la elprovitaj NAI-teaman(in)oj li komencis enprofundiĝi en la laborojn.
Ni deziras al Michael multe da feliĉo kaj sukceso kaj petas al ĉiuj niaj partneroj daŭrigi la kunlaboradon kun li kiel nova ĝenerala sekretario.



**Manfred Pils**

Manfred Pils estis la antaŭa ĝenerala sekretario de NAI kaj dum jardeko li per sia profesia kompetenteco, organiza talento, naturamika pacienco kaj grandan engaĝiĝon stampis la laborojn de NAI. Per li daŭrigebla disvolvo kaj eko-turismo ekhavis altan rangon en la naturamika movado. Eŭrop-vaste li per sia laboro donis profilon al NAI. Internaciaj projektoj kiaj « Pejzaĝo de la Jaro », « Verdaj Vojoj al Estonteco », « Bluaj Riveroj por Eŭropo » kaj « Natura 2000 » dum lia deĵor-periodo fariĝis gravaj eroj de la NAI-laboro.

Ni dankas al Manfred por lia grandega aktivado, por lia sukcesplena laboro por NAI. Post la eksiĝo kiel ĝenerala sekretario li restos honora gvidanto de la turisma laborrondo de NAI kaj konsilanto de la estraro.

---

## TANEF-KUNVENO

Dum la 77-a SAT-Kongreso en Bratislava (SK), je dimanĉo, la 15-an de aŭgusto vespere de la 20.00/21.00 h. La Naturamikoj devas dividi la disponeblan tempon kun la fakgrupo de Ekologiistoj. Grava malfacilaĵo estas ke post la subita eksiĝo de Dirk Willkommen, ne estas prezidanto. Nova internacia fakreferanto povos esti nomumita en la NFI-Kongreso en 2005.
Dum la kunveno en Bratislava la plej urĝe necesa demando priparolota estos: "Kiu estos la nova internacia fakreferanto?". Kandidatoj ankaŭ povas sin kandidatigi ĉe Bert de Wit, se vi ne povas partopreni la kunvenon aŭ dum la kunveno ĉe la kasisto Eric Baert. Necesas esti membro de iu landa Naturamika Movado.
Se restos pli da tempo, la ĉeestontuloj de la kunveno pritraktu la raportojn de kasisto kaj ĉefredaktorino. Proponoj por nia laboro estas tre bonvenaj!


Antje Noordewier.

# La 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto 2004.


*Kubo (foto Eric Baert)*

La 6-a TAKE okazis en Havano, la ĉefurbo de Kubo. Havano havas enloĝantaron de 2,1 milionoj, unu kvinono de la tuta popolo de la insulo. Pro ĝia eksterordinare favora situo kaj meznombra klimato inter 21 kaj 28 gradoj C., kunteniĝas ĝia evoluo strikte kun tiu de la mara komerco. Apud malnova urbo el koloniala pasinteco, ekzistas ankaŭ modernaj kvartaloj kun nubskrapuloj. Havana posedas la plej gravan havenon, flug-havenon kaj tre variajn industriojn: cementon, rafinejojn, konsumado-artikolojn kaj estas la registara kaj kultura centro de la lando. La insulpopolo vivas de tabakokulturado, citrusoj, sukerkano, fiŝkaptado, turismo, elfosado de nikelo, agrikulturo.

La kongrestemo estis : « Kia Esperanto-movado por Ameriko?". Ĉeestis 170 partoprenantoj el 17 landoj, ĉefe el Ameriko (eĉ el Usono), sed ankaŭ el Eŭropo kaj eĉ du el Ĉinio.
Oni prelegis pri instruado, pri kultura integriĝo , pri la internacia lingvo kiel protektilo de la kultura diverseco fronte al la lingva imperiismo, pri terapioj kaj pri la esperanta traduko de la gazeto « Le Monde Diplomatique « .
Estis tri ekspozicioj, kiuj montris la centjariĝon de Esperanto en Kubo, la kvin kubanojn enkarcerigitajn en Usono kaj infandeseg-



naĵojn el Uzbekistano. La kultura programo estis tre kleriga : nacia vespero en la Palaco de la Revolucio, vizito al la muzeo de la nacia heroo José Marti, la rigardado de la malnova urbo. Dum la tuttaga ekskurso ni vizitis " Las Terrazzas ", reservejo de la Biosfero, malnova kafoplantejo aŭ la fama marborda banejo " Varadero ".




La Kuba Esperanto Asocio (KEA) organizis tre interesajn postkongresajn ekskursojn. Unue ni iris dum tri tagoj orienten : Cienfuegos kaj la malnova urbo Trinidad, Santa Clara kie okazis gravaj agadoj dum la revolucio. Tiam ni iris okcidenten kaj vizitis cigaro- kaj rumfabrikojn en Pinar del Rio. En la Valo de Vinales ni vidis strangan pejzaĝon kun kalkmontetoj nomitaj " mogotes" kaj ni promenis piede tra la kamparon kie kreskas la tabako kaj medicinaj plantoj.

Dum tiu kongreso ni renkontis homojn, fierajn pri sia lando kaj pri siaj naciaj herooj malgraŭ la ĉiutagaj malfacilaĵoj (varoj, transportoj, manĝaĵo). Por bone sperti la vivon de la kubanoj, belga partopreninto loĝis ĉe kubana familio anstataŭ hotelo kaj tiamaniere li partoprenis en ilia ĉiutaga vivo. Dankon al KEA por tiu interesa travivaĵo. En la retpaĝo eo.mondediplo.com (sen www) estas detala artikolo pri Kubo de Djémil Dessous.

Eric Baert, Belgio.

**Kelkaj respondoj al la demando : Kio farebla per Esperanto?**

La amikeca Reto.

La amikeca reto kreiĝis dum la SAT-Kongreso en 1987. Ĝi estas senprofita asocio kun sindonemaj kunlaborantoj. La gvidlibro entenas pli ol 400 adresojn en 40 landoj. Per tiuj adresoj kun multaj informoj, oni celas la faciligon de homoj interrilatoj, ĉefe dum vojaĝoj. La retanoj, kies adreso aperas en la libro, plezure akceptas homojn kun la deziro uzi Esperanton kaj interŝanĝi spertojn kaj ideojn. (aliĝado senpaga)

Eblas interŝanĝi i.a. domon dum la ferio; pro multaj kialoj la reciproka gastigado estas grava.

Centra sekr: 88, rue Victor Hugo, FR-37400 Amboise. Tel.+33 247575563. Rete: a.reto@france-association.com aŭ regionaj perantoj.

Pasporta SERVO.

La listo de esperantistaj gastigantoj "Pasporta Servo" enhavas 1227 adresojn en 79 landoj. La gastigantoj ricevas ĝin senpage, aliaj povas mendi ĝin kontraŭ 15€ + sendk. ĉe la UEA-libroservo. Inf.: rete: paspserv@wxs.nl

## HOMO HOMOJN LUPO ESTAS

Lastatempe ni aŭdis pri la kruel-eco kaj torturado de Usonaj sol-datoj en Irako. Ŝajne oni ne bezonas esti adepto de Sadamo por torturi homojn. La tuta milito de Bush, bazita sur mensogoj kaj potencpolitiko, nun eĉ perdis la nuran pozitivan flankon kiun ĝi laŭdire havis, nome ke diktatora reĝimo estas faligita kaj homoj ne plu bezonas timi persekutadon kaj torturadon.
Kelkaj homoj kiuj verŝajne ne studis historiajn ekzemplojn, estas mirigitaj ke ion tian Usonanoj povas fari. La reprezentantoj de demokratio kaj justico...Tion ja nur faras malbonuloj, kiaj la helpantoj de dikatatoroj, de la « reprezentantoj de la Malbono ». Jen preskaŭ religia aplombo per kiu oni pravigis la militon kaj okupadon de Irako.
Nu vere, se oni bone rigardas la historion, oni scias ke en ĉiuj reĝimoj kiuj subpremas larĝajn grupojn de la loĝantaro, tiaj praktikoj okazas. Okazis en Indonezio fare de nederlandaj soldatoj, okazis en Alĝerio fare de francaj soldatoj, okazis en Ĉinio far japanaj soldatoj, okazis en Tibeto far ĉinaj soldatoj, okazis en Vjetnamio far Usonanoj, k.t.p.
Ekzemple Sartre verkis pri la demando kiel eblas ke ŝajne ordinaraj homoj povas fariĝi torturisto. Okazis pluraj eksperimentoj far psikologoj por vidi ĝis kie homoj pretas torturi alian homon en la nomo de iu sankta ordo aŭ simple laŭkomande.
En 1971 psikologo Philip G. Zimbardo de Stanford Universitato en Kalifornio metis anoncon en gazeton en kiu li serĉis studentojn pretajn partopreni en eksperimento por vidi la psikologiajn efikojn de malliberereco. Li selektis el la kandidatoj mezklasajn, inteligentajn studentojn kaj dividis la grupon en gardistojn kaj malliberulojn. La malliberulajn studentojn oni « arestis » neatendite, transportis ilin al la malliberejo, sencimigis kaj nudigis ilin kaj alĉenigis metalan globon al la piedoj. La gardistaj studentoj ricevis la ordonon nur gardi la ordon. La psikologo vidis kiel en malmultaj tagoj, el inteligentaj studentoj fariĝis kruelaj gardistoj, kiuj senhezite metis sakojn sur la kapojn de la malliberuloj, unue ribelemaj, sed poste timemaj. Post ses tagoj Zimbardo ĉesigis la eksperimenton, kvankam li unue planis ankoraù unu semajnon plian. La situacio fariĝis tro danĝera kaj por eviti katastrofon, la eksperimenton li finis.
Ke ordinaraj homoj povas transformiĝi en torturistojn, jam estis konate el aliaj eksperimentoj en kiuj aŭtoritata esploristo ordonis al ili senkapigi ratojn.
Ankaŭ la eksperimento de psikologo Stanley Milgram ĉe Yale-universitato en la jaro 1961 estas konata. Li diris al studentoj ke ili partoprenos eksperimenton kiel instruisto pri puno kaj lernado. Lernanto devis ripeti vortojn de

instruisto kaj se tiu eraris, la instruisto donis elektran ŝoketon al la lernanto. La elektropulso povus laŭ la skalo kreski ĝis 450 Voltoj, kio estas mortiga. Sed envere ne estis elektra kurento, sed tion la instruistoj ne sciis. 26 el 40 personoj pretis enŝalti 450 Voltan kurenton por puni siajn lernantojn, kiuj (aktore) kriegis pro doloro. La konkludo: tute ordinaraj civitanoj pretis sen iu ajn devigo torturi aliajn homojn se iu aŭtoritatulo diris ke tio estas en ordo.
La nura signifa rezisto venis de tiuj kiuj havis pli altan moralan nivelon. Tiaj homoj estis ekzemple ortodoks-religiaj homoj respektante la fizikan integrecon de la individuo kaj principaj pacistoj. Cetere, se unu persono en la grupo de torturistoj principe kaj laŭte ribelis kontraŭ la torturado, montriĝis ke la aliaj ankaŭ ekribelas.. Do, restas ankoraŭ iom da espero, ĉu?

Estas eĉ filmo pri la eksperimento kiun la germana filmisto Oliver Hirschbiegel faris en 2001. Ĝin oni montras en la alternativa filmcirkvito. Filmo kiu ne estas plezuraĵo, sed eble bone por plifortigi vian moralan nivelon. Eble ĝi kostos al vi unu nokton da maldormo?

Bert de Wit
(laŭ artikolo en Volkskrant, majo 2004)

**Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.**

**Artikolo 1.** Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsiencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco.
**Artikolo 2.** Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso,haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.
Plie, nenia diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratureco, ne-sinreganta au sub kia ajn alia limigo de suvereneco.
**Artikolo 3.** Ĉiu havas la rajton je vivo, libereco kaj persona sekureco.
**Artikolo 4.** Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco ; sklaveco kaj sklavkomerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.
**Artikolo 5.** Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehoman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.
**Artikolo 6.** Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

La Esperantan tekston eldonis : Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 1963.

## La Sterniĝarbo.

En la Ekstrema Nordo, ĉe la limo inter tajgo kaj tundro, inter nanaj betuloj, malaltaj sorparbustoj kun neatendite grandaj, helflavaj , akvoplenaj beroj, inter sescentjaraĝaj larikoj, kiuj atingas maturecon je tricentjara aĝo, vivas neordinara arbo – la sterniĝarbo. Ĝi estas fora parenco de cedro, ĉiamverda konifera arbusto kun trunkoj iom pli dikaj ol homaj brakoj kaj du-tri metrojn altaj.

La sterniĝarbo estas senkaprica kaj kreskas alkroĉiĝante per radikoj je la ŝtonaj fendoj de la monta deklivo. Ĝi estas kuraĝa kaj obstina kiel ĉiuj nordaj arboj, ĝia sentivo estas eksterordinara.

Estas malfrua aŭtuno, delonge estas tempo por neĝo, por la vintro. Dum multaj tagoj laŭ la rando de la blanka firmamento moviĝas malalte pendantaj nubegoj ekimoze bluaj. Sed hodiaŭ matene la aŭtuna trapenetranta vento iĝis minacante kvieta. Ĉu odoras je neĝo ? Ne, ne neĝos ĉar la sterniĝarbo ne ankoraŭ kuŝiĝis. Kaj tagoj pasis post tagoj, la neĝo ne venis, la nuboj vagis ie malantaŭ la montetoj kaj en la altan ĉielon leviĝis pala, malgranda suno, kaj ĉio estas kiel en la aŭtuno.

Sed sterniĝarboj ekkliniĝas. Ili kliniĝas ĉiam pli malalten, kvazaŭ sub senmezura, ĉiam kreskanta pejzaĵo. Per siaj pintoj ili gratas la ŝtonojn kaj alpremiĝas al la tero, etendante siajn smeraldajn branĉojn. Ili sterniĝas. Ili estas similaj al polpoj ornamitaj per verdaj plumoj. Unu tagon, du tagojn ili kuŝatendas kaj jen el la blanka ĉielo jam surŝutiĝas neĝo kiel pulvoro ! La sterniĝarboj mergiĝas en vintran dormadon kiel ursoj. Sur la blanka monto ŝvelas neĝovezikoj – tio signifas ke la sterniĝarboj kuŝiĝis por vintrodormo.

Sed en la fino de la vintro, kiam neĝo ankoraŭ kovras la teron per trimetra tavolo, kiam en intermon tejoj la neĝventegoj batpremis densan neĝon, homoj vane serĉas signojn pri printempo en la naturo. Laŭ la kalendaro la printempo devus jam alveni sed ne distingiĝas la tago de la aliaj vintrotagoj. La aero estas maldensa kaj seka, ne diferenca de la januara aero. Tamen la sentoj de homo estas tro krudaj, liaj perceptoj estas tro simplaj. Kvankam li havas kvin sensorganojn, tio ne sufiĉas por aŭguroj kaj divenado.

La naturo estas pli delikata ol homo en siaj sentoj. Ni scias ja ion pri tio. Ĉu vi memoras fiŝojn de salmospecioj, alirantaj por fraji nur en tiun riveron, kie estis frajita la frajero, el kiu evoluis ĉi tiu fiŝo ? Ĉu vi memoras la enigmoplenajn vojojn de birdaj migroj ? Ne malmultaj barometroplantoj, da floroj barometraj estas konataj al ni. Kaj jen inter la neĝa senranda blanko, inter plena senespero, neatendite ekstaras

sterniĝarboj. Ili forskuas la neĝon, rektiĝas en sian plenan staturon, levas al la ĉielo sian verdan, glaciigitan, iomete flavruĝetan pinglaron. Ili aŭskultas neperceptebIan por ni, la vokon de la printempo kaj kredante ĝin ekstaras plej frue en la Norde.

**La vintro finiĝis !**

Okazas ankaŭ io alia : lignofajro. La sterniĝarboj estas facilkredemaj. Ili tiel malŝatas la vintron ke ili emas kredi al la varmo de lignofajro. Se vintre apud fleksiĝinta trunko iu faras lignofajron, la sterniĝarbo ekstaros. Kiam la lignofajro estingiĝos kaj la seniluziiĝinta sterniĝarbo plorante pro la ofendo, denove kurbiĝas, ĝi denove kuŝiĝas sur sian malnovan lokon.

Kaj neĝo kovros ĝin.

Ne, la sterniĝarbo estas ne nur aŭguranto de la vetero. Ĝi estas la arbo de esperoj, la unusola ĉiam verda arbo en la Ekstrema Nordo. Inter la blanka neĝbrilado ĝiaj senbrilverdaj pinglo-branĉoj parolas pri la sudo, pri varmo kaj vivo. Somere ĝi estas modesta kaj nerimarkebla. Ĉio ĉirkaŭe haste disvolviĝas, penante plenflori dum la mallonga norda somero. La floroj printempaj, someraj, aŭtunaj kursuperas unu la alian en neretenebla impeta florado, sed la aŭtuno alproksimiĝas kaj jen ŝutiĝas jam malgrandaj, flavaj pingloj nudigante la larikojn, volviĝas palflava herbo kaj sekiĝas , malpleniĝas la arbaron kaj tiam fore videblas ke super la palflava herbo kaj griza musko brulas inter la arboj grandegaj verdaj torĉoj de la sterniĝarboj.

Mi ĉiam imagas la sterniĝarbon kiel la plej poezian rusan arbon , pli bonan ol la gloritaj plorsaliko, platano aŭ cipreso.

Varlam Ŝalamov (1907-1982).
Esp. traduko : Olga Goriĉenko, Murmanska reg. Rusio.

**Kelkaj gravaj Esperantaj Kunvenoj.**

10-18 julio 2004
40-aj jubileaj Baltaj Esperanto-tagoj (BET40) en urbo Birshtona.
Inf.: Litova E-Asocio, p.k.167, LT-44287, Kaunas. Litovio.
Rete: litova.ea@mail.it

24-31julio 2004
89-a Universala Kongreso en Pekino, Ĉinio. Inf. UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Roterdamo, Nederlando. Tel +31 (0)10 436 1044. uea@inter.nl.net

**14-21 aŭgusto 2004.**
77-a SAT-Kongreso en Bratislava Slovakio. Inf.: Petro Chrdle, Anglickā 878, CZ-252 29, Dobřichovice, Ĉeĥio.
Tel.: +420 257 712 201
Rete: info@kava-pech.cz
La kongreso okazos en la hotelo Bratislava, kie la kongresanoj ankaŭ povos loĝi. Temas pri 3-stela hotelo kun kongresa salono Alia loĝebleco estas pli malmultekosta studenta hejmo.

**Gazetara teksto - Naturamika Internacio.**

## NAI Eŭropa voĉdono 2004 "Alia Eŭropo estas ebla".

Post jarcentoj de dividita Eŭropo kreskas ĝi al unueco. Post multaj militoj kaj faŝismo naskiĝas nova ŝtatunuiĝo kaj paceme kunvivantaj kulturoj.
Eŭropo troviĝas en impona grandioza evoluprocezo. Sed ankoraŭ ne decidiĝas ĉu la eŭropa vojo al la estonteco estos unu de solidareco, sociala justeco kaj ekologia renovigado aŭ de naciaj kaj neo-liberalaj egoismoj.

"Tial – laŭ la NAI-prezidanto Herbert Brückner – estos la voĉdonado en junio, pli ol elekto-devo ; ĝi estas ŝanco por pridestini la estontan vojon de Eŭropo ".

La Naturamika Internacio alvokas vin nepre partopreni tiun voĉdonadon ; ekzakte ekzameni tion, kion la kandidatoj eldiris kaj subteni tiujn kiuj la demokratan, socialan kaj ekonomian modelojn kiel alternativo volas efektivigi.
Koncerne tion apartenas i.a. :

- la kunligado de la plivastigo de Eŭropo en tutaĵon pere de konsekvenca eŭropa justeco-politiko kaj politiko de daŭrigebla disvolvo. Unu forta Eŭropa Unio kun demokrate legitimitaj organoj devu en senco de societaj kontraktoj garantii socialan respondecon kaj justecon.
- la efektivigo de la principo pri daŭrigebla disvolvo kiel demokrata kaj solidara progresmodelo ankaŭ en la respondeco por la batalo kontraŭ mizero, por pacpolitiko kaj justa mondekonomia ordo. Laŭplana ekspluatado de evolulandoj pere de subvenciego de la propraj produktoj estontece ne plu okazu.

Kune kun la internacia mediomo movadoj de la « green 8 »(verdaj ok), la Naturamikoj havas retan manifeston, alireblan per: www.nfi.at/europa

La demokratio kaj solidareco estas kaj restos la fundamentoj por unuiĝinta Eŭropo, por tiu ni volas voĉdoni je la 13-a de junio eŭropan parlamenton, kiu estu dediĉita al ĉi tiuj celoj.

---

**Reĝustigo :**

En la artikolo "Energio por ĉiam ?"(L.M.178) la vorto malvarmeco en la 3-a linio, devas esti **varmeco.** En la 4-a linio staras « fuzio » sed la verkisto uzis la francan fission = fendiĝo. Esperantlingve fisio. Laŭ PIV fuzio estas kunfandiĝo de asocioj, societoj, kompanioj.

## Virinoj, pri kiuj la mondo povas esti fieraj.

Alfred Nobel, la sveda kemiisto kaj inventisto naskiĝis la 21-an de oktobro 1833 en Stokholmo kaj mortis la 10-an de decembro 1896 en San Remo, Italio. Li estis i.a. la eltrovinto de nitroglicerino (1864), dinamito (1866), de gelateno-eksplodaĵoj kaj senvaporiĝanta pulvo (1887). Entute 355 inventaĵoj, el kiu dinamito estis la plej grava.

Li fondis uzinojn en sia patrio, laboratorion en Parizo (1869) sed translokis tion al San Remo (Italio). Alfred Nobel, kiu ne havis gefilojn, decidis heredigi la plej grandan parton de sia grandega kapitalo al fondaĵo. El la interezoj ĉiujare estas disdonataj la tiel nomataj Nobelpremioj pri fiziko, kemio, medicino aŭ fiziologio, literaturo kaj paco.

La unua ceremonio por prezenti la premion okazis ĉe la Reĝa Akademio de Muziko en Stokholmo (Svedio) en 1901. Ek de 1902 la premiojn formale donis la reĝo de Svedio, krom la pacpremio kiun donas la norvega reĝo en Oslo (Norvegio). Norvegio kaj Svedio estis unio ĝis 1905. Dum la solena ceremonio la premiita scientisto devas prelegi pri sia fako.

Depost 1901 estis nur dekunu virinoj, kiuj ricevis la Nobelpremion por Paco.

La unua gajnintino estis la aŭstria baronino Bertha von Suttner en 1905 : ŝi estis honora prezidantino de la « Konstanta Internacia Oficejo por la Paco « kaj bona amikino de Alfred Nobel. En tiu tempo virino devenu de alta societo por akiri la premion. Cetere estis nur riĉaj knabinoj kiuj trovis la eblecon havigi bonan edukadon. Nur ili povis dediĉi sin okulfrape al tia lukso kia la mondpaco tiam estis.

La dua kaj tria virino estis ambaŭ el Usono. Jane Adams(1931) estis bonfarantino, deĉidinte sin al la malriĉuloj en la dua plej granda urbo de Usono, Ĉikago kaj estis prezidanto de « Internacia Virinasocio por Paco kaj Libereco ». Emily Greene Balch (1946) estis pacbatalantino kaj honora prezidantino de la sama organizo kiel Jane Adams estis.

Daŭris ĝis 1976 kiam estis la vico por du dommastrinoj en Irlando. Ili estris « la socio por pacaj homoj », kiuj deziris finiĝi la perforton en Irlando. Malgraŭ tiu dividita Pacpremio ĝis hodiaŭ daŭras la netoleremo inter la du partioj.

Tri jarojn poste la Patrino Theresa el Hindio ricevis la pacpremion. En 1982 venis la dekoracio al la sveda ministrino por senarmigo, Alva Myrdal. Sed en la naŭdeka jaroj plirapidigis la afero. Tri gajnintinoj !

En 1991 ni konatiĝis kun la birmanan Aung San Suu Kyi, la ĝis tiam nekonata batalantino por demokratio kaj homaj rajtoj.



*Rigoberta Menchu*

Unu jaron poste (1992) la nobelkomitato honoris Rigoberta Menchu-n, indianan virinon gualtemalan, kiu verkis la libron « Mi, Roberta » kaj per tio atentigis la senrajtigecon de sia popolo.
En la jaro 1997 la premio estis denove dividita inter du virinoj : Lady Diana kaj Jody Williams (Britio) kiuj kunbatalis por la malpermeso de teraj minoj.
La dekunua premiita virino estis la irana juristino Shirin Ebadi pro sia penado por demokratio kaj homaj rajtoj, antaŭ ĉio pro la batalo de la rajtoj de virinoj kaj infanoj. En epoko de perforteco ŝi kon-sekvence elektis por paco kaj justeco. Ebadi estas konscia mo-hametanino, ŝi ne vidas konflik-ton inter islamo kaj fundamentaj homaj rajtoj. Estas grave por ŝi ke oni subtenas samajn valorojn kiel deirpunkto por dialogo inter la diversaj kulturoj kaj religioj en la mondo.

La prezidanto de la norvega Nobelkomitato, Ole Danbolt Mjoes nomis Ebadi-n, la gajnintinon de la PACpremio 2003 : **virino pri kiu la mondo povas esti fiera. Sendube tio validas ankaŭ por la dek aliaj.**

En la artikolo "Ĉu seksismo en la Akademio?" (Revuo de Esperanto n-ro 1167) de Marko Lins kaj Dafydd ap Fergus, la verkistoj konstatis ke ankaŭ en la organo de la plej spertaj esperantistoj la virinoj preskaŭ mankis. Ĉu ili ne estas sufiĉe talentaj por fariĝi membroj de la Akademio de Esperanto? La situacio iom pliboniĝis sed longe Marjorie Boulton estis la sola virino. Nuntempe nur ses virinoj membras en la 44-kapa Akademio de Esperanto. Ĝenerale en la esperantologio kaj rilataj kampoj severe mankas virinoj, same kiel inter la prelegantaro ĉe internaciaj kongresoj. La kialo certe estas ne ke la akademio estu seksisma, ĉu povus esti ke virinoj ne havis sian lokon en ĝi kaj manko al memfido ĉe virinoj ĝenerale ? La vira supereco estis kaj restis en multe da ŝtatoj kaj religioj.
Ankaŭ ĉe SAT oni sentas la mankon je virin-partopreno kaj alvokis por IN-fako "Emma". Nur 32% el la tuta membraro estas inaj, jam tiu nombro montras ke, laŭ la alvoko, ke IN-fako nepre nesecas i.a. ĉe la verkado de internaj artikoloj por La Sennaciulo kaj Revuo.
A.N.

## La birdoj en mia regiono.



Ekzistas multaj bestoj kiuj demetas ovojn por reproduktiĝi. Vi pensu pri rampuloj, testudoj kaj kompreneble birdoj. Multaj rampuloj metas siajn ovojn simple en sablon. Ili uzas la varmecon de la suno por kovi siajn ovojn. Konata ekzemplo estas la testudo kiu prezentas siajn ovojn en la marbordan sablon. Post iom da tempo la testudidoj elkoviĝas kaj tuj rapidas al la maro. Tie ili kreskadas, maturiĝas kaj post kelkaj jaroj ili demetos siajn ovojn en la saman marbordan sablon.
La birdoj agas iom pli zorgeme pri siaj ovoj.
Ili bone preparas la lokon, kie ili demetas siajn ovojn.
Ili gardas pri ili kaj zorgas por sufiĉe da varmeco por kovi ilin. La nestojn vi ĉie povas trovi, en arboj, sur la tero, en arbustaro kaj eĉ sur plantoj en la akvo. Ankaŭ la nestfarado estas tre diferenca. Iufoje estas nur kuveto en herbejo, alifoje aro da branĉetoj, pajleroj kaj aliaj aĵoj. Kelkfoje ili prezentas verajn konstruaĵojn. Tiom longe, kiom sufiĉa naturo estas disponebla, la birdoj trovos konvenan lokon por sia nesto. Sed kelkaj specioj de birdoj havas nuntempe problemojn. Ili preferas truojn por konstrui sian neston. Oni nomas ilin enkavaj kovantoj. Sed daŭre oni konstruas pli da sentruaj muroj kaj eĉ ŝtopas ĉiajn fendojn.... Tiel la enkavaj kovantoj ne plu trovas lokon por konstrui sian neston. Tiu ĉi mankon da konstruebleco ni povos solvi per pendigo de kestetoj je la fasado de niaj domoj.



### La pigo : (pica pica)


Por la pigoj la ovoj de fazanoj kaj perdrikoj estas bongustaĵoj. Pro tio la naturgardistoj ne aprezas la pigojn. La pigo konstruas sian neston en altaj arboj. La supro de la nesto estas fermata. Ĝi nur havas aperturon por povi fluge eniri ĝin. La nesto enhavas 6 aŭ 8 ovojn. Post kovado de 18 tagoj la pigidoj prezentas sin. La idoj estas senplumaj kaj ne povas vidi. Sed post kvin tagoj la okuloj malfermiĝas. Post kvar semajnoj ili flugas el la nesto. Sed la familio restos kune ĝis la vintra periodo.



### La korniko aŭ nigra korvo : (Corvus corone)


Kornikoj vivas en bone organizita grupo en kiu ĉiuj havas propran lokon. Ili preskaŭ ĉion manĝas sed grandparte animalan manĝaĵon kiel insektojn, ovojn kaj junajn birdojn. Kiam ili estas dujaraj, ili serĉas kunul(inon) por la resto de sia vivo. Dum la tria vivjaro ili kovas siajn ovojn. Ili nestas en kamentuboj aŭ en kavoj de arboj. La korniko kolektas lanon aŭ harojn de ĉevalaj dorsoj aŭ de ŝafoj por tegi la neston. La idoj restas 30 tagojn en la nesto antaŭ ol elflugi.
Kolektis kaj tradukis Aad de Jong, Nederlando. *(Daŭrigota)*

## La Naturamika Domo « Het Hunehuis » remalfermita



*La remalfermo de Hunehuis. (foto :B.Noordewier)*

La tute renovigita naturamika domo « Het Hunehuis » apud la nederlanda vilaĝo Havelte en la provinco Drenthe malfermis siajn pordojn la 15-an de majo 2004. Nur la muroj de la malnova konstruaĵo restis vertikalaj. La tuta internaĵo estas renovigita, nun kun vasta akcepthalo, tri salonoj, ampleksa kuirejo kaj apartemento por la domgardistoj (volontuloj). Al la malnovaj muroj estis konstruitaj du novaj dormejoj, entute kun 72 litoj, dividitaj en 29 ĉambroj. Pro la naŭ tri- kaj kvarpersonaj ĉambroj ĉi tiu domo estas oportuna por familioj kaj grupoj. Kvar dupersonaj ĉambroj havas proprajn duŝojn kaj necesejojn ; por la aliaj estas komunaj banejoj en la koridoroj. Ĉe la rekonstruo laboris 50 volontuloj kune kun la arkitekto, la konstruentreprenisto kaj Nivon-konstrukomisiono. La arkitekto estas spertulo de medio-indulgaj konstrumetodoj kaj kune ili faris planojn. Ili elektis por medio-indulgaj materialoj, energiŝparaj teknikoj kaj bela aspekto. Ili elektis por unuetaĝaj dormejoj, surkreskataj per sedo. Laŭ niaj prapatroj tiuj plantoj forpelus la fulmo-tondron. La rezulto estis bonega. La ĉirkaŭaĵo de la domo ĉiam estis eksterordinare bela en regiono, riĉa pri naturbeleco. Por amantoj de simpla kampado estas ankaŭ naturtereno ĉe la domo. Ne por ruldomoj, nur tendoj.



*La konstruo de dormejo. (foto : Gr.Noordman)*

La tuta provinco Drenthe estas konata pro reto de bonegaj biciklaj vojoj.

Tarifoj por restado, po unu nokto :
a.plena tarifo : la unua de aprilo ĝis la unua de novembro kaj la 25a de decembro ĝis la unua de januaro.
b.malaltarifo : la 1-a de januaro ĝis la 1-a aprilo kaj la unua de novembro ĝis la 25a de decembro. La rabato tiam valoras ĉe restado de pluraj noktoj.
Plenkreskuloj : por membroj de aliĝintaj naturamikaj movadoj (kun membrokarto) : a : € 12,65 b : € 8.85. Ne-membroj : a : €16,40. b : € 16.40 (por unu nokto) pluraj noktoj : € 11.50.
Infanoj 3 ĝis 16 jaraj : € 9.50. b : € 6.65. Ne-membroj: € 11.20 b : € 7.85.
Infanoj ĝis 3 jaraĝaj estas senkostaj, kondiĉe ke ili tranoktas en infanlito, (luebla en la domo).

Adreso: Hunehuis, Hunebeddenweg 1, NL-7973 JA Darp, Nederlando.
Tel: (+31) 0521 341248.
Sekretario por enskribigo: Trijnie Trip, telefono: (+31) 0529-497034.
Rete: hunehuis@nivon.nl

Atingebleco: Trajne ĝis la stacidomo Steenwijk, de tie per trajntaksio. Per aŭto ekde la vilaĝo Havelte, vojo N353 en la direkton Frederiksoord, post 1,5 km. dekstren.